Recent members who are now sending \$10.00 per month are: *H. Sloan* and *Anonymous* (usona oficisto eksterlande). Also \$100.00 just received from another anonymous (Miĉiganano). Our sincere thanks and appreciation. Others: *A. S. Mellichamp*, \$15 (additional to \$10 per month); *Julia May Leach*, \$10; *Grace Randolph*, \$10 (additional); *Elwood R. Etter*, \$10; *Dr. Lehman Wendell*, \$5; *Anonymous* (Baltimorano), \$7; *David Richardson*, \$5; *Arnold Pennekamp*, \$4; *Richard Earnhart*, *Elise Lippmann*, *V. Rev. Gabriel N. Pausback*, *Charles Solin*, *Jack Whitman*, \$2 each; and many, when ordering books from *American Esperantist* (which is a most important way to provide profits for A.E. through book sales), send more than the required amounts with request to “keep the change for Sustaining Fund”: *G. Clayton*, *W. D. B. Hackett*, *Yitkon Ho*, *W. J. H. Knappe*, *Karl Nell*, *Harold Schroepfel*, *Eugene Thompson Jr.*, *George Wagner*, and others. *Mrs. Olive H. Campbell* sends \$1.00 per month to help with postage; — she writes: “I enclose stamps for October “dues” on postage bills, and I wish you both a better outlook than you have had so far.” In the name of EANA, thank you one and all! To other members who are planning to give for *Esperanto in America*, won’t you join *now* in a veritable crusade which will culminate in the establishment of an *Esperanto Center* for effective work in the higher phases of Esperanto promotion?

Contributions & dues to EANA are deductible for income tax purposes.

NORDAMERIKA ESPERANTO-KONGRESO

KONGRE SANO

Nur trifoje en la historio de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko sinkvaj kongresoj okazis en la sama loko. En 1908 kaj 1909 EANA organizis siajn unuajn du kongresojn en Chautauqua. En 1912 kaj 1913 la 5-a kaj la 6-a kunvenis en Boston. En 1946 kaj 1947 la unuaj du postmilitaj kongresoj okazis en Conway, en la ŝtato New Hampshire, en la "arbara, bona, laga kaj monta paradizo" de la Centro por Mondfrateco (World Fellowship Center), kies estroj estas membroj de EANA. Fakte la Aga Komitato ne intencis inviti la membrojn denove al Conway en ĉi tiu jaro, sed aliaj urboj, kiuj unue ŝajnis tre taŭgaj, ne povis esti elektataj pro diversaj kaŭzoj, kaj fine la tempo estis tiom progresinta, ke la plej simpla solvo de la problemo estis fari la samajn aranĝojn kiel lastjare.

El la anglalingva raporto sendita al la membroj de EANA antaŭ iom da tempo multaj el niaj legantoj jam scias, ke la kongreso, kvankam malgranda, laboris bone kaj tre sukcese. Gesamideanoj el plej diversaj partoj de Usono kaj Kanado ĉeestis, junaj kaj maljunaj, novaj kaj malnovaj. Ili venis fervoje, aŭtobuse, aŭtomobile kaj aeroplane, unu membro eĉ en sia privata aeroplano.

La kongreso voĉdonis preskaŭ unuanime por nova statuto. Nur du voĉoj estis kontraŭ ĝi. Jam antaŭe en skriba voĉdono la membraro akceptis ĝin per 152 kontraŭ 4 voĉoj. La esenca celo de la statuto estas krei solidan bazon por la laboro kaj kontinueco de la Asocio. La ĉefan aŭtoritaton ĝi metas en la manojn de 7-persona Estraro. Ĝi estas sufiĉe granda por reprezenti diversajn vidpunktojn kaj geografiajn regionojn, sed samtempe sufiĉe malgranda por povi decidi rapide pri gravaj aferoj. La Estraro unuanime elektita en Conway,

konsistas el la jenaj gesamideanoj:

Prezidanto: Profesoro Edwin L. Clarke, Winter Park, Florida; *Vicprezidanto:* D-ro William A. Solzbacher, Yonkers, New York; *Ĝenerala Sekretario:* S-ro G. Alan Connor, New York, New York; *Kasisto:* S-ro Harry M. Harrison, New York, N. Y.; *Asociaj Direktoroj:* S-ro Dan Ward Gibson, Seattle, Washington (por 2 jaroj); D-rino Lydia Allen DeVilbiss, Miami, Florida (1 jaro); S-ro Joseph Leahy, Washington, D. C. (kiu jam estis elektita kiel Membro de la Aga Komitato ĝis 1948).

La kongresanoj multe bedaŭris, ke la Prezidanto de EANA, Profesoro Clarke, pro grava familia kaŭzo ne povis ĉeesti. Oni entuziasme aplaudis lian raporton senditan al la kongreso kaj decidis sendi al li dankleteron. Pro lia foresto oni utiligis la talenton de sufiĉe granda nombro da "portempaj" prezidantoj. S-ro Leahy, Membro de la Aga Komitato kaj estinta Ĝenerala Sekretario, prezidis la unuan laborkunsidon, D-ro Solzbacher, la nova Vicprezidanto, la lastan. D-rino DeVilbiss prezidis la tri aliajn. F-rino Roan Orloff agis kiel Loka Kongresa Komitato, organizante kaj estrante tre interesajn vesperajn programojn. S-ro William Vathis redaktis viglan kaj varian Vivantan Gazeton. En unu kunveno, kiu estis tute en Esperanto, tri gravajn paroladojn prezentis F-rino Roan Orloff, S-ro Ernest G. Dodge, kaj D-ro Solzbacher.

S-rino Connor, Helpa Sekretariino de EANA, ankaŭ laŭlegis tre interesan raporton de la Komitato pri Publika Informado. Ŝi montris, ke la tempo nun estas matura por pli grandskala propagando en Nordameriko. Ni aŭdis kun plezuro, ke en la pasinta jaro "La Voĉo de Ameriko", la tutmonda radio-programo de la usona registaro, dufoje dissendis pri

Esperanto kaj ke tio rezultigis leterojn el malproksimaj landoj. La radiostacio WNYC, kiu apartenas al la Urbo New York, disaŭdigis Esperanto-programon por duagradaj lernejoj. Multaj informpetoj estis la rezulto. En diversaj lernejoj en New York kaj aliloke Ges-roj Connor faris sukcesajn paroladojn kaj provlecionojn. Multaj ĵurnaloj publikigis artikolon de la fama ĵurnalisto Bob Considine pri la lingva problemo en la Unuigitaj Nacioj kaj Esperanto. La kanada ĵurnalisto Marcus Van Steen publikigis efikajn artikolojn pri Esperanto en la semajna aldono al la "Montreal Standard" kaj en "Catholic Digest" (Julio 1947). EANA daŭrigis sendi "Amerikan Esperantiston" al diversspecaj eminentuloj. Eĉ en aliaj landoj EA NA helpis la por-Esperantan laboron. En Berlin, ekzemple, la grava ĉiutaga ĵurnalo "Der Tagesspiegel" publikigis (la 5-an de Majo 1946) klarigojn de S-ro Connor pri la lingva problemo en la Unuigitaj Nacioj kaj la neceseco de Esperanto.

La Komitato pri Enciklopedioj, kies Prezidanto estas Profesoro Clarke kaj kies raporto estis laŭtlegata de S-ino Cora L. Fellows, unu el ĝiaj membroj, raportis pri klopodoj enigi freŝdatajn informojn en diversajn enciklopediojn.

Unu el la plej interesaj raportoj en Conway estis tiu de S-ro Howard Latham (kiu bedaŭrinde ne povis ĉesti persone) pri agado en la lernejoj kaj inter la junularo. Li klarigis, kiamaniere li kreis intereson pri Esperanto inter la instruistoj kaj lernantoj en sia regiono (Livingston County, ŝtato New York) kaj organizis Esperantokursojn en diversaj lernejoj, promesante premion al la plej sukcesa lernanto. Tiom longe, ke la lernejoj ne donas "punktojn" ("krediton") por Esperanto-lernado same kiel por aliaj fakoj, premioj estas tre gravaj, li diris.

Skriba raporto de S-ro Glenn P. Turner pri la UNO-Petskribo sciigis, ke li jam forsendis pli ol 7,000 subskribitajn foliojn al Anglujo. La plimulto venis el Usono kaj Kanado, sed estis ankaŭ proksimume 150 el Puerto-riko, 100 el Ĉinujo, 100 el Singaporo, kelkaj el la Filipinaj Insuloj ktp.

La financa raporto, verkita de S-ro Harry M. Harrison, montris pli grandajn enspezojn ol lastjare, pro pli granda nombro da membroj, ankaŭ Patronoj kaj Subtenantoj, sed eĉ pli grandan kreskon de la elspezoj, pro pli altaj kostoj de papero, presado, oficeja materialo ktp. La ĝenerala konto montris malgrandan deficiton. Ĝi povas esti pagata el la gajno de la lasta jaro, tamen la kreskinta membronombro eĉ pli urĝe necesigas efikan oficejon kun pagataj helpantoj.

En la Prezidanta Raporto Profesoro Clarke menciis la necesecon de pli altaj kotizoj. Okazis sufiĉe longa diskuto pri la afero. Ĉiuj konsentis, ke du dolaroj ne plu sufiĉas kiel jara kotizo kaj ke tri dolaroj devus esti la minimumo. Multaj kongresanoj esprimis la penson, ke la plimulto de la membroj povas kaj devus pagi almenaŭ 5 dolarojn. Tamen estas eble, ke kelkaj ne povas fari tion. Ili devas resti membroj kun plenaj rajtoj. Oni ne devas doni al ili la impreson, ke ili estas duagradaj membroj aŭ ke ili ricevas almozon, se ili pagas nur 3 dolarojn. La definitiva solvo de la problemo estas lasata al la Estraro, tamen la fundamenta ideo sendube estas, ke ĉiuj, kiuj iel povas fari tion, devas esti urĝe informataj, ke oni atendas de ili almenaŭ 5-dolaran kotizon de Membro-Subtenanto. La simpla membro-kotizo de 3 dolaroj ne devus esti tiu de la plimulto de niaj membroj.

Inter la rezolucioj de la Kongreso (preparitaj de Komitato, kies Prezidanto estis S-ro Dodge) estis unu, kiu rekomendas, ke la Esperanto-klu-

boj zorgu, ke ilia adreso estu en la telefonlibro de ilia urbo sub la vorto "Esperanto". Alia rezolucio oficialigas la du devizojn: "Ĉiu membro varbu novan membron", kaj "Ĉiu membro subtenu la Subtenkomitaton".

Varbado de novaj membroj estas sendube unu el niaj plej urĝaj taskoj. La raporto de la Ĝenerala Sekretario montris, ke laŭ relativa vidpunkto EANA faris belan kaj daŭran progreson en la lastaj jaroj. La nombro de membroj, kiu estis nur 327 en marto 1945, kreskis al 383 en Januaro 1946, al 527 en Aŭgusto 1946, al 691 en Marto 1947, al 729 en Majo 1947. Tamen la nuna nombro certe ne estas inda de Nordameriko. Ni eĉ ne povas riski mencii ĝin en la anglalingva parto de "Amerika Esperantisto", kiu, laŭ la opinio de multaj, aspektas kiel organo de multe pli granda asocio. En la parolado, kiun li faris en Conway pri "Amerika Esperantisto", D-ro Solzbacher atentigis, ke la nuna stato de EANA estas, en certa maniero, kritika kaj danĝera. Se la membronombro estus inter 200 kaj 300, la laboro de la Asocio povus esti farata de kelkaj personoj en ilia libera tempo. Se la membronombro estus inter 2,000 kaj 3,000, la Asocio havus sufiĉe da mono por profesia oficejo kun pagataj oficistoj. Sed nun, estante en "transira" periodo inter la du situacioj, EANA havas tro multe da laboro por la libervola sistemo, tro malmulte da mono por la profesia sistemo. Ni do devas aŭ malsuprenfali en la "malaltan" klason aŭ suprengrimpri en la "altan". Se ĉiu membro serioze agus laŭ la devizo, "Ĉiu membro varbu novan membron", la suprengrimpado povus estis farata rapide. Se tiuj, kiuj havas okazon por tio, varbus 2, 3, 5, 10 aŭ 20 novajn membrojn kaj se la aliaj varbus *almenaŭ unu*, kelkaj monatoj sufiĉus por levi nian Asocion en pli altan kategorion. La aŭtuno estas la plej favora tempo por

varbado. Kial ni ne povus konkrete traduki la devizon en la formulon: "*Ĉiu membro varbu novan membron antaŭ la fino de la jaro!*"

Kie trovi la novajn membrojn? Ho, karaj geamikoj, ekzistas multaj eblecoj. Ĉu vi scias, ke eĉ en la lokaj Esperanto-kluboj de Usono kaj Kanado estas personoj, kiuj ne estas membroj de EANA? Ekzistas ankaŭ multaj malnovaj Esperantistoj, kiuj perdis kontakton kun la movado. Eble ili atendas nur vorton aŭ leteron de vi por fariĝi membroj. Kelkaj foriris pro disputo kun iu gvidanto aŭ membro. Eble *vi* povas klarigi al unu el ili, ke membreco en EANA estas partopreno en granda movado, ne persona favoro farata al iu individua Esperantisto. Studentoj kaj studentoj de Esperanto-kursoj estas oportunaj objektoj por membrovarbado. Inter la multaj personoj, kiuj esprimis simpatian al la Esperanto-movado, sed kiuj ne mem lernis la lingvon, devus esti almenaŭ kelkaj, kiujn vi povus konvinki, ke membreco en EANA — aŭ almenaŭ abono al "Amerika Esperantisto" — helpos ilin pli bone kompreni kelkajn el la problemoj de la internacia vivo. Se vi bone pripensas la aferon, vi eble trovos multajn eblajn objektojn por *via* varbado. Certe vi trovos almenaŭ unu!

La kongreso en Conway — kiel Esperanto-kongresoj ĝenerale — kreis multe da entuziasmo kaj plifortigis la amikecon inter malnovaj Esperantistoj. Tamen estis bone, ke kelkaj kongresanoj en Conway ne estis malnovaj, sed novaj Esperantistoj. Ni esperu, ke en la venonta jaro, kiam la kongreso eble okazos en Toronto, la nombro de la "novuloj" estos multe pli granda. EANA ne devas esti malgranda grupo da malnovaj kaj maljunaj amikoj, sed efika kaj moderna instrumento por enkonduki la Interlingvon en praktikan uzon en ĉiuj fakoj de la vivo.

RIGARDANTE TRA LA JARLIBRO

La unua impresó pri la Jarlibro de UEA kaj IEL por 1947 (Unua Parto) estas, ke ĝi vere estas libro. La 250-paĝa volumo aspektas bele kaj impone. Oni povas montri ĝin al ne-Esperantistoj, por atentigi ilin pri la praktika utileco de nia lingvo por la internacia vivo. La tempo de la maldikaj broŝuroj forpasis. Ni ja ankoraŭ ne reatingis la staton de 1928, kiam UEA eldonis 608-paĝan Jarlibron, sed se la progreso daŭras, kiel en la lastaj du jaroj, ni baldaŭ havos 1000-paĝan Jarlibron.

Alia grava fakto estas, ke la Jarlibro estas eldonita komune de Internacia Esperanto-Ligo (IEL) kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA). Estonte la ĝenerala Esperanto-movado havos nur unu internacian organizon. La skismo de 1936 estas venkita per reciprokaj koncesioj kaj la komuna volo labori nur por la bono de la movado. La nuna Jarlibro ankoraŭ ne plene montras la rezultojn de la reunuiĝo, sed ĝi certe indikas la komencon de la nova vojo. Estas vere, ke en la pasintaj dek jaroj UEA nur unufoje eldonis propran Jarlibron (204-paĝan), en 1939/40, tamen la ekzisto de du delegitoretoj estis senencaĵo. La kunfando de la du retoj sendube pliigos la nombron kaj la kvaliton de la delegitoj

La statistikoj de IEL (pĝ. 34-35 kaj 240-41) estas interesaj. La plej grandan nombron de membroj havis Britujo (2,846) kaj Francujo (2,511). Por Usono la statistiko indikas (por la 31-a de Decembro 1946) 594 IEL-membrojn, por Kanado 30. Ŝajnas, ke la Asociaj Membroj el Kanado estas enkalkulitaj en la usona cifero. Tio ne estas tute justa. Laŭ la tuta membronombro Usono okupas nur la naŭan lokon: post Britujo, Francujo, Svedujo, Nederlando, Danujo, Jugoslavujo, Bulgarujo, Norvegujo. Tamen

por la aktivaj membroj (MJ, MA, MS ktp.) Usono okupas la kvaran lokon: post Britujo, Nederlando, Francujo; por Membro-Abonantoj ankaŭ la kvaran lokon: post Britujo, Nederlando, Francujo; por Membro-Subtenantoj la trian: post Britujo kaj Nederlando. Laŭ la proporcio inter aktivaj membroj kaj asociaj membroj Usono okupas la trian lokon inter la landoj, kies naciaj organizoj estas aliĝintaj al IEL: ĝia loko estas post tiuj de Ĉekoslovakujo kaj Britujo. Usono havas (laŭ la Jarlibro) 82 Delegitojn, 6 Vic-Delegitojn kaj 30 Fak-Delegitojn. Laŭ la nombro de Delegitoj ĝi okupas la kvaran lokon: post Britujo, Francujo kaj Nederlando. Kanado havas 10 Delegitojn, 1 Vic-Delegiton kaj 1 Fak-Delegiton.

Laŭ mia opinio ne estas malbona afero, ke Usono kaj Kanado ne partoprenis en la ridinda inflacio de Fak-Delegitoj. En kelkaj landoj preskaŭ ĉiu membro de IEL sajnis havi la ambicion fariĝi Fak-Delegito kaj vidi siajn nomon kaj adreson presitaj en la Jarlibro. Se la persono estas tajloro, li fariĝas Fak-Delegito pri "tajloraj aferoj", se li scias naĝi, pri "naĝaferoj", se li fumas, pri "tabakaj aferoj", se li ne fumas, pri "kontraŭ-tabakaj aferoj". Mi trovis 219 specojn da Fak-Delegitoj en la Jarlibro por 1947! Kelkaj landoj groteske troigis la specialigon, ekzemple Brazilo, kie estas nur 23 Delegitoj, sed 61 Fak-Delegitoj, Portugalujo, kie ekzistas 30 Delegitoj kaj 42 Fak-Delegitoj, aŭ Hispanujo, kiu nombras 15 Delegitojn kaj 27 Fak-Delegitojn.

Komprenoble la nombro de membroj kaj Delegitoj de UEA en Usono kaj Kanado ankoraŭ ne estas kontentiga. Estas iom hontige, ke estas pli multe da membroj en Sud-Ameriko ol en Nord-Ameriko. Kelkaj gravaj urboj tute ne havas Delegitojn.

Nun estas la tempo por pagi vian UEA-kotizon, 1948, al la Centra Oficejo.

HISTORIO DE LA FILIPINA STANDARDO

MAXIMIANO MARMITO VILLAREAL

En Esperanto

La filipina standardo enhavas du striojn.

La supra strio estas blua; la suba, ruĝa.

La ruĝo signifas fortan kaj kuraĝon.

La bluo signifas idealojn kaj justecon.

Apud la stango troviĝas aparta triangula spaco.

Tiu spaco estas blanka.

En la centro estas ora suno, havanta ok radiojn.

La suno signifas liberecon, aŭ la naskiĝon de nova nacio.

La ok radioj aludas al la ok provincoj, en kiuj ribelado kontraŭ Hispanujo komenciĝis.

Tiuj provincoj estis: Manila, Bulakan, Pampanga, Nueva Ecija, Morong, Laguna, Batangas, kaj Cavite.

La blanka triangulo signifas egalecon kaj fratecon.

En ĉiu angulo de la triangulo troviĝas ora stelo.

La tri steloj aludas al la insulo Luzon, la Visaya-insularo, kaj la insulo Mindanao.

Kelkfoje oni nomas la filipinan standardon "Filino de la Revolucio", ĉar tiu flago ekestiĝis dum la filipina revolucio.

La 12-a de Junio, 1898, estis la dato, kiam tiu nacia standardo estis oficiale akceptata kaj rajtigata de la filipina Kongreso.

Inter ĉiuj standardoj de sendependaj landoj, tiu de Ĉekoslovakujo plej similas tiun de la filipina insularo.

In English

The Philippine flag consists of two stripes.

One is red and the other is blue, the blue being on the top.

The red signifies bravery and courage.

The blue represents ideals and justice.

Near the staff is a triangular space. This space is white.

In the center is a golden sun having eight rays.

The sun signifies liberty or the birth of a new nation.

The eight rays represent the eight provinces in which rebellion against Spain started.

These provinces were: Manila, Bulakan, Pampanga, Nueva Ecija, Morong, Laguna, Batangas, and Cavite.

The white triangle stands for equality and brotherhood.

In each corner of the triangle is a golden star.

As there are three stars in all, they represent the Islands of Luzon, the Visayas, and Mindanao.

Sometimes the Philippine flag is called "Daughter of the Revolution", because it came into existence during the Philippine Revolution.

It was on June 12, 1898, that the national flag was officially adopted and recognized by the Philippine Congress.

Among the flags of independent nations, the flag of Czechoslovakia is the nearest in appearance to the Philippine flag.

Send Esperanto Christmas Cards this year. See back cover page this issue.

32-A UNIVERSALA KONGRESO, BERN, 1947

HAROLD SCHROEPPLE

Oficiala Reprezentanto de E.A.N.A.

La urbo Berno estas tiel bela, eĉ apud la fervojo, ke estis preskaŭ nekredeble. Post Parizo, kiun ni ĵus forlasis, Berno aspektis kiel bela ĝardeno, zorge aranĝita kaj purigita. Ni alvenis iom post la deka horo matene, kaj trovis amason da Esperantistoj en la stacidomo. Ni havigis niajn paperojn en malgranda ĉambro en la stacidomo, kaj la sola malfacilaĵo de la Kongreso okazis tie. Ni devis atendi du horojn por ricevi niajn dokumentojn, monon, manĝ-kuponojn, loĝejon, kongresprogramon, k.t.p.

Ni — tio estas mia edzino kaj mi — loĝis en privata hejmo, kie oni komprenis nur "Sweitzer Deutch" kaj iomete de la franca lingvo. La interkomprenado estis iom malfacila, sed en la Kongreso mem la lingvaj baroj ne aperis. Ĉio estis bone kaj efike organizita.

La kongresejo estis la Berna Kazi-no. Ĝi estas bela, ŝtona konstruaĵo, kiu staras sur la riverbordo alte super la rivero, kiu ĉirkaŭas la malnovan urboparton. La verda standardo kaj longa rubando kun la vortoj "32-a Universala Kongreso de Esperanto" indikis la lokon.

Sabaton vespere en la Kornhauskeller (kelo de la grendomo) okazis interkonatiĝa vespero. Granda kalkŝtona ŝtuparo kondukis nin en la ejon, kaj post tio mi memoras nur pri voĉa bruo, muziko, ridado, granda ĉambro plena de tabloj, seĝoj kaj Esperantistoj, odoro de fumo cigareda, verdaj steloj ĉie, premado por trapasi la amason, feliĉaj amikaj voĉoj, svedaj kostumoj, svisaj kantistoj kaj jodlistoj, trinkaĵoj ĉiuspecaj, bonkoreco, kaj la ĉiama bruo de voĉoj! Mi mem renkontis gesamideanojn el Francujo, Svedujo, Nederlando, Svislando kaj Hungario.

La solena malfermo de la Kongreso okazis Dimanĉe, 27-an de Julio, akurate je la deka horo. La granda ĉambro estis tute plena. Estis floroj sur la podio. Granda Esperanto-standardo pendis de la plafono. La standardoj de tridek-du nacioj pendis sur la muroj. La salutparoladoj estis iom longaj, sed la parolado de la Svisa registarano interesis nin. Li diris, en sia dek-kvin minuta parolado, ke li opinias, ke nia unulingva solvo de la lingva problemo estas pli bona ol la svisa trilingva solvo. D-ro Ivo Lapenna de Jugoslavio enkondukis politikan paroladon, sed plejparte la salutvortoj temis pri ĝojo je atingita unueco de la neŭtrala Esperantomovado. Mi mem salutis la Kongreson en la nomo de EANA.

Dimanĉon posttagmeze, ni ĉeestis diservon en la mezepoka katedralo de Berno. La diservo okazis tute en Esperanto kaj estis sufiĉe interesa. La kolektaĵon oni donis al la svisaj samideanoj por helpi Esperantistojn malsatantajn de aliaj landoj. La katedralo estas tre bele ornamita ekstere, sed interne tre severa, kun tre malmolaj seĝoj!

Tiuvespere okazis kunveno de la komitato de IEL-UEA. Mi ĉeestis kiel anstataŭanto por S-ro G. Alan Connor, kiu estas komitatano en la nomo de EANA. La diskuto en Esperanto estis tre vigla. La kunfandiĝo de la IEL-UEA estis finita. Nova prezidanto de la asocio devis esti elektata, ĉar la ĝisnuna prezidanto, Generalo Bastien, informis pri sia firma decido ekŝiĝi. Do, la komitato devis proponi alian nomon. Oni kune parolis dum kelkaj sekundoj, sed mi aŭdis nur unu nomon — tion de S-ro Ernfrid Malmgren de Svedujo. Li estis elektita sen eĉ unu neo.

Sekvis semajno de komitataj kunvenoj, laborkunsidoj, fak-kunsidoj, paroladoj, paroladoj, paroladoj. Inter aliaj aferoj, oni decidis fari specialan propagandan klopodon en Islando, per la sendado de tre efika propagandistino el Svedujo por fari kursojn, paroladojn k.t.p.

Okazis dum la Kongreso ekskursoj al Schwarz-See, Jungfrauoj, Interlaken kaj tra la urbo. La unua de Aŭgusto estas la Svisa Nacia Festtago. La urso-standardo de Berno aperis ĉie, kaj ankaŭ la Svisa nacia standardo. Posttagmeze kaj nokte estis artfajraĵoj. Nokte mi kaj la edzino batalis nian vojon al la monteto Gurten. Ni atendis dum pli ol unu horo por veturi per la ŝnurfervojo, sed la vidaĵo supre estis belega. Malsupre aperis lumoj de la urboj, longaj linioj de ruĝaj fest-lampoj, kaj la eklumoj de multaj raketeksplodoj.

Nia postkongresa vojaĝo kondukis nin al Wengen en la Bernese Oberland apud la monto Jungfrau. Tie troviĝas tiel bela loko, ke mi tuj

elektis min kiel "Komerca Ĉambro de Unu" por Svislando. Vizitu la lokon! Wengen estas proksimume tri mil futojn super la valo Lauterbrunnen, kaj estas multe pli bela ol la aŭŝoj pri Svislando. Ni povis vidi du belajn akvofalojn, la valon Lauterbrunnen, kaj la monton Jungfrau de nia hotelo. La akordo de ĉiu konstruaĵo kun la naturo estas vere mirinda. Tie la mondo restas en paco.

Por mi la Universala Kongreso estis ĝojinda sperto. Dum tiuj tagoj mi pli kaj pli lernis babili tute nature en nia lingvo. Mi bone komprenis la paroladojn. La diskutoj multfoje estis viglaj — eĉ "varmegaj" — sed ĉiu persono povis rekte diskuti la aferojn. Nur tri Usonanoj partoprenis en la Berna Kongreso, nome: Mi kaj mia edzino, Martha, kaj s-ro James D. Sayers el Nov-Jorko. La venontjara Kongreso okazos en Malmo, Svedujo, kaj laŭ mia opinio la partopreno de bona grupo da Usonanoj estus tre bone — por la Kongreso, por la Esperanto-movado, kaj por vi mem!

EXCELLENT TEXTBOOK AT LOWEST PRICES

The *Reed Grammar*, by Dr. Ivy Kellerman Reed, is one of the best texts available for English speaking peoples. It is admirably suited for both individual and class study. It contains 142 pages (more than twice the size of Home Student), with very complete examples of all grammatical elements.

The *Reed Grammar* was printed to sell at 75c, but the photo-process printing is slightly blurred on a few pages through the book. Because the book is slightly less than the best quality printing, we are offering it at unheard of bargain prices. You will be doing yourself, your students, and your EANA Committee, a real service by

ordering this text as your standard Grammar.

Bertha Helmer, teacher of Esperanto, Fargo, N. D., writes: "Mi ŝatas la *Reed-Grammatikon* tre multe, kaj la studentoj ŝatas ilin ankaŭ. La enhavo estas tre bona, kvankam la presado estas iom malbona. Sed ni bone komprenas ĝin—kio estas plejmulte grava."

Put them to work at making Esperantists, at every opportunity. All *postpaid* from *American Esperantist*:

	★		
1	<i>Reed Grammar</i>	reduced to \$.50
5	" "	45c each	2.25
10	" "	40c "	4.00
20	" "	35c "	7.00
100	" "	32c "	32.00

LA LEClONO

Kompilita de Doris Tappan Connor

(*Ĝelernantoj evenas brue, kaj sidiĝas. La instruistino sonorigas sonorileton, kaj komencas saluti*): Bonan tagon, ĝelernantoj! Ĉu vi estas sanaj hodiaŭ?

Grupo: (unuvoĉe) Jes, instruistino, ni estas sanaj!

Inst: Bone! Ni havas interesan lecionon hodiaŭ. Sed, unue, permesu al mi demandi: Kio estas via nomo? (*montrante al lernantino*)

Lilio: Mia nomo estas Lilio Bruno.

Inst: Kaj kion viaj gepatroj nomas sin?

Lilio: Paĉjo kaj Panjo.

Inst: Jes, certe, sed la nomo?

Lilio: Nur Paĉjo kaj Panjo.

Inst: (kun ĉagreno demandas al alia) Nu . . . kio estas via nomo?

Dua-L: Ho, mia nomo estas la sama kiel tio de Paĉjo kaj Panjo.

Inst: Kaj kio estas iliaj nomoj?

Dua-L: Same kiel la mia!

Inst: Ni komencu la lecionon!

Tria-L: (levas la manon kaj krias) Instruistino! Instruistino!

Inst: Jes?

Tria-L: Ĉu vi punus knabon pro ago kion li ne faris?

Inst: Komprenable ne! Kial?

Tria-L: Nu . . . mi ne lernis mian lecionon!

Inst: Heh? Do, vi estu la stultulo de la grupo. (*sidigas lin en angulon, kaj metas sur la kapon stultul-ĉapelon*) Nun . . . denove al la leciono! (*demandas al alia lernanto*) Kial la vortoj en Esperanto havas radikojn?

Kvara-L: (levante la manon) Mi scias! Mi scias! Por ke la lingvo kresku!

Inst: Vi ĉiuj estas stultuloj! Ĉu vi scias ion pri geografio?

Grupo: Ho, jes . . . ni scias ĉion!

Inst: Nu . . . dekstre estas oriento. Maldekstre estas okcidento. Antaŭ vi

estas nordo. Kio estas malantaŭ vi?

Grupo: La fenestro! (*aŭ kio ajn estas tie*)

Inst: Iru al la landkarto de la mondo, Petro, kaj montru al ni Amerikon. (*Petro tion faras*) Tio estas ĝusta. Jen, lernantoj, diru al mi, kiu eltrovis Amerikon?

Grupo: Petro!

Inst: Heh? Ĉu vi ne memoras pri Kristofa Kolombo?

Dua-L: (levante la manon) Jes, mi scias. Li estis Italiano, kiu eltrovis Amerikon por la reĝino de Hispanujo, en la jaro 1492. En la jaro mil-kvar-cent-naŭdek-dua, Kolombo velveturis sur la oceano blua!

Inst: Tre bone! Vi estas inteligenta knabineto. Sed, nun, ĝelernantoj, kion vi scias pri matematiko?

Grupo: Ni scias ĉion!

Inst: Bone — Se domo havas kvar ŝtuparojn, kaj ĉiu ŝtuparo havas dek ŝtupojn, kiom da ŝtupoj oni devas supreniri por atingi la supron?

Grupo: Jes, certe!

Inst: Ne, ne — Kiom da ŝtupoj?

Petro: Kiom — eh — jes. Kiom da ŝtupoj? Ho, jes — ĉiujn!

Inst: Nu, ĉu vi scias ion pri gramatiko?

Grupo: Cert! Ni scias ĉion!

Inst: Ni nun volas fari frazojn kun personaj pronomoj — li, mi, vi, kaj tiel plu. Se, ekzemple, la Patro dirus: "Mi foriros hodiaŭ vespere," kion respondus la Patrino al li?

Petro: Ŝi dirus: "Vi restos hejme!" (*la grupo ridas*)

Inst: Gramatike analizu la frazon, "Petro edziĝis kun Lilio".

Dua-L: Petro estas substantivo, ĉar ĝi estas nomo de iu. Edziĝas — estas konjunkcio, ĉar ĝi kunigas Petron kun Lilio. Kaj — Lilio estas — verbo, ĉar ŝi regas la substantivon!

Tria-L: (*venas de la angulo*) Instruistino, mi havas belan bildon por vi. Estas pri la Biblio.

Inst: Ĉu vere? Montru ĝin al la grupo.

Tria-L: (*montras pecon de blanka, absolute senmakulita papero*) Tiu bildo prezentas la pason de la Izraelidoj tra la Ruĝa Maro.

Inst: Sed, kie estas la maro?

Tria-L: Ĝi jam foriris!

Inst: Kaj kie estas la Izraelidoj?

Tria-L: Ili jam pasis!

Inst: Kaj kie estas la egiptoj?

Tria-L: Ili ankoraŭ ne alvenis!

Inst: Nu, tio sufiĉas! Vi estas optimisto!

Kvara-L: Instruistino, mi scias pri la optimisto.

Inst: Bone! Kion vi scias?

Kvara-L: Pesimisto kaj optimisto estis du muŝoj. Ili ambaŭ falis en glason da lakto. Pesimisto nenion faris por savi sin, kaj dronis. Sed optimisto naĝadis — kaj naĝadis — kaj naĝadis, ĝis la batado de ĝiaj kruroj faris bulon da butero. Li sidiĝis sur la butero, sekiĝis kaj forflugis.

(*La lernantoj ridas laŭte. La instruistino regardas la horloĝon kaj denove sonorigas la sonorilon dirante "Bonan tagon! Ĝis la revido!" La lernantoj stariĝas kaj forkuras el la ĉambro dirante la samon.*)

PAŬLO KAJ GAŬLO

Vivis Paŭlo kaj Gaŭlo en dom' tiu sama:
 Paŭlo supre, kaj Gaŭlo malsupre loĝadis.
 Paŭl' neniun ofendis — trankvila, pacama;
 Plej sovaĝajn petolojn do Gaŭl' elpensadis.
 En la ĉambro li ĉasis: jen hund', jen leporo;
 Inter tabloj kaj seĝoj li pelas kaj sonas
 Kaj trumpetas kaj pafas; en ĉasa laboro,
 Kriegante, saltante, laciĝon ne konas.
 Paŭlo ĉion toleras, sed fine ne povas . . .
 Iras suben al Gaŭlo, petegi lin provas:
 "Kompatigu, sinjoro, kaj ĉasu pli mole,
 Ĉar ja supre la vitroj ekfalis senvole."
 Sed el Gaŭlo je tio: "Libera hometo en sia dometo."
 Kion je ĝi respondi? Ĉapelon Paŭl' prenis;
 Li eĉ vorton ne pepis kaj hejmen revenis.
 Morgaŭ Gaŭlo ankoraŭ bonguste ronkadas,
 Jen nazon lian io de plafon' gutadas . . .
 Li eksaltis el lito kaj supren rapidas.
 Frap'! Frap'! — Fermite! Kio? Per tru' li ekvidas
 Strangaĵon: Tuta ĉambro estas akvoloko,
 Kaj Paŭlo sur komodo sidas kun fiŝhoko.
 "Sinjor', vi kion faras?" — "Mi kaptas fiŝetojn!"
 "Sed, sinjor', mi sur kapo ja sentas gutetojn!"
 Kaj je tio ĉi Paŭlo: "Libera hometo en sia dometo."
 El fablo morinstruon vi legos facile:
 "Vi tiel al alia, li al vi simile!"

—Aleksandro Fredro (Tr. Leo Belmont)

ESPERANTO-KRONIKO

James D. Sayers, Nov-Jorka Esperantisto, revenis al Ameriko por mallonga vizito en Aŭgusto de Germanujo. Li servas kiel Pres-Kontrolisto por la Usona Registaro. S-ro Sayers raportis pri bona progreso de Esperanto en Germanujo, kaj pri la Universala Kongreso en Berno, kie li vigle partoprenis kiel nova Komitato de U.E.A. S-ro Sayers multe klopodas por Esperanto en Germanujo. Li lasis belan fotografafan pri Esperanto Pikniko de la Esperantistoj de Giessen, Wetzlar kaj Friedberg, Germanujo, en la montoj apud Wetzlar, en Julio. La foto montras 36 bonegajn kaj feliĉajn gesamideanojn kune kun S-ro Sayers. Inter aliaj troviĝas D-ro Prof. Rheinhard Strecker (kun edzino), Instruistino S-ino Erika Heidegger, kaj S-ino Grete Kraft, organizantino de la Friedberga Klubo. La bildo estas vere tiel bona kiel bela signo de la revivanta Germana movada, ke ni ja bedaŭras la neeblecon presi ĝin. S-ro Sayers forte impresis nin pri la granda bezono pri nutraĵo en Germanujo, kaj li proponas ke kluboj kaj individuoj en Usono adoptu Germanajn familiojn por sendi al ili grason, kafon, viandon, k.t.p.

S-ino Cora L. Fellows, de Staten Island, N. Y., akceptis tre bonan intervjuon post sia reveno de la Esperanto-Kongreso en Conway, fare de skribisto Bill Thompson de la *Staten Island Advance*. En tiu ĵurnalo, 17-an Julio, troviĝis granda kaj frapanta artikolo pri Esperanto, donita de S-ino Fellows—kaj bela foto de ŝi kun Esperanto gazeto.

Armin F. Doneis, Pharr, Texas, konstante helpas al Esperanto. Antaŭ nelonge li faris paroladon pri Esperanto en Edinburg, Texas, ĉe Stud-Grupo pri Internaciaj Rilatoj; ankaŭ paroladon en Pharr, ĉe Klubo de Leonoj (Lions' Club).

La Ekzamena Komitato de EANA raportas la jenajn samideanojn sukcesaj pri la *Atesto pri Kapableco*: Milton E. Davis, Sanitarium, Calif., Richard Anson Earnhart, Kingsville, Texas—ambaŭ kun rajto de daŭra instruado. — Ĉiuj Esperantistoj devus provi siajn kapablojn en Esperanto; petu inform-cirkuleron de la Centra Oficejo.

La Oficiala Pres-Protokolo de la Parlamento de Usono, *Congressional Record*, presis artikolon pri Esperanto, 26-an de Julio. Ĝi estis enmetita de Kongresano C. Jasper Bell, Reprezentanto de Missouri, kaj verkita de Maximiano Marmito Villareal, kiu deĵoras ĉe gazeto en Vaŝingtono pri la Filipinaj Insuloj. S-ro Villareal hazarde kaptis la okazon enmeti artikolon pere de Reprezentanto Bell; kaj havis tiun artikolon en la poŝo. En sia artikolo, li gratulas S-inon Eleanor Roosevelt pri ŝiaj, oftaj mencioj pri bezono de internacia lingvo, kaj skribis: "La ordinara civitano devus senti ke la solvo de mond-problemoj estas lia patriota devo pere de instigado ĉe UNO-Reprezentantoj por voĉdoni favore al la adopto de la internacia lingvo Esperanto por oficiala uzo en tiu organizo." Krome, S-ro Villareal sukcesis aranĝi por senpaga *dissendo* de tiu artikolo en oficialaj kovertoj de Reprezentanto Bell. Jen, samideanoj, tre bona oportuno por propagando je la plej malmultekosta maniero: *Sendu tuj al Amerika Esperantisto por granda provizo de tiuj artikoloj, en oficialaj kovertoj pretaj por dissendi tute senkoste kaj sen poŝtmarkoj. Vi nur devas skribi adresojn de gravaj personoj en via komunumo aŭ kono, kaj ilin enpoŝtigi. La Centra Oficejo disponos ilin al vi je la prezoj: \$1.00 por 200; \$2.00 por 500; \$3.00 por 1,000. Dissendu ilin multinombre! Al konatuloj kaj aliaj personoj!*

DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonceto: Eksterlande, 2 int. resp. kuponoj; Enlande, 5 cendoj por unu vorto.

Siamo. S-ro Sie Sujun, The Trans-Ocean Trading Co., 314 Suerpa Road, Bangkok. Komercisto, dez. kor. precipe kun samfakuloj.

Usono. S-ro John Walter Murray, 410 Poplar St., Roselle, N. J. Dez. kor. kun aliaj popoloj, Esperante, Germane, Itale, France, Nederlande, Ruse, Hispane, Norvege. Interesiĝas precipe pri scienco, lingvoj, Biblio.

Cekoslovakio. S-ro J. V. Haering, Nad. kral. oborou 43, Praha XIX/14. Dez. kor. kaj interŝ. il. PK.

Nederlando. S-ro D. Prins, Lernejestro, Grypskerk. Serĉas korespondantojn por siaj lernantoj.

Francujo. S-ro Roucheton Gilbert, 24 rue Pierre Dupont, Tullins (Rhône). 36-j. dez. kor.

Japanujo. Kozi Akizawa, 1618 Kitagawati-Kori, Osaka. 16-j. junulo dez. kor. pri PM, il. PK, muziko, radio, kaj pri vivo de junuloj en Usono.

Japanujo. Ichihiko Onoe, 1501 Kori, Neyagawa, Kitagawati, Osaka. 17-j. dez. kor. Interesiĝas pri klasika muziko kaj basbalo.

Japanujo. S-ro Yonemi Maeda, Komatubara dori 6, Wakayamasi. 28-j. kor. pri vivo kaj kutimoj en Usono.

Aŭstrio. S-ro Eduard Gartner, Saalfelden 337. am st/M., Salzburg. Dez. kor. tutmonde.

Hispanujo. S-ro Vicente Santamaria, Sorni 18, Valencia. 35-j. dez. kor. kun Usonanoj.

Argentino. F-ino Alice Paredes, Belgrano 232, Necochea, Buenos Aires. 18-j. studentino dez.kor. pri vivo, arto, kulturo, industrio de Usono.

Madeiro. S-ro M.M. Lourenco de Gouveia, Rua das Dificuldades 28, Funchal. Dez. interŝ. il. PK. bildflanke afrankita.

Romanujo. S-ino Elizabeto Zolyomi, Strada Horea 80, Huedin, (jud. Cluj). Profesorino dez. kor.

Bulgario. S-ro St. Karidov, str. Levzky 4, Burgas. Dez.kor. tutmonde, interŝ. PM. Respondo garantiata.

Bulgario. S-ro Georgi Perkov Lazarov, "Rajonno inĝenerstvo", Burgas. Dez.kor. tutmonde, interŝ. il. PK.

Bulgario. S-ro Nikola Najdenov, Str. Patriarch Eftimi 64, Burgas. Dez. kor. kun sindikalistoj pri literaturo de ĉiuj landoj.

Cekoslovakio. Jan Bambasek, Praha VIII/14. Dez. kor. kun iu.

Cekoslovakio. S-ro Rene Vodička, Benešova tr. 26, Bechyne (apud Tabor). Studento, skolto, dez. kor. pri literaturo, kostumoj.

Finlando. F-inoj Saara Vakkinen kaj Verna Vakkinen, Harjutie 44 B, Tampere. Dez. kor. kun Usonanoj.

Germanujo. S-ro GeorgBuna, Suitbertusstr. 180 II, Dusseldorf 22a (Rhld), Brita Zono. 52-j. maŝinisto dez. kor. pri ĉiuj temoj.

Germanujo. S-ro Gerhard Sixtus, Paretzer-str. 1, Wilmersdorf-Berlin (1), Brita Zono. Berlina studento de arkitekturo serĉas korespondantojn el Usono. 20-j. dez. interŝ. PM. Respondo garantiata.

Germanujo. S-ro Reinhard Unde jun, Kornstrasse 156, Bremen, U.S. Zono. 17-j. dez. kor. kun junuloj.

Hungario. S-ro Janos Banyay, Orosz-lan u. 2, Szeged. Modpeltisto dez. kor. kun samprofesianoj.

Hungario. Prof. J. Kondor, Madach u. 5, Nyiregyhaza, Szabolcs m. 10 studentoj 13-17-jaraj de gimnazio, dez. kor. Respondo garantiata.

Hungario. S-ro Kovi Istvan, Konstantin ter. 2, Vac, Pestneegy. Dez. kor. tutmonde.

Indoĉinujo. S-ro Phan Van Cau, 39 Place de Dakao, Saigon. Dez.kor. kun tutmondo.

Italujo. Rag. Pierino Castiglioni, via Lambroso 28, Torino. Serĉas seriozajn komercajn reprezentadojn.

ESPERANTO BOOKS

The Central Office is now equipped to supply all your book needs. When you buy books from "American Esperantist" all profits are used to give you a better magazine and a better E.A.N.A. Place all your book orders through "American Esperantist".

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. 64 pp., newly printed 14th edition.....	.25c
PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Dr. Ivy Kellerman-Reed. More complete beginner's text. 142 pp. (war-time edition), formerly .75c, now only	.50c
STEP BY STEP IN ESPERANTO, M. C. Butler. Excellent simple text with instruction and numerous exercises. 244 pp. Paper, .85c; Cloth,	\$1.25
A PRACTICAL COURSE IN ESPERANTO, Szilagyi. Illustrated text.....	.60c
ESPERANTO, G. Alan Connor & Doris T. Connor. (World Language Series, edited by Prof. Mario A. Pei). A practical introduction to Esperanto, and systematic phrase-book. 32 pp.65c
LANGUAGES FOR WAR AND PEACE, Mario A. Pei, Ph.D. Guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> (see above). 663 pp. cloth	\$5.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, by Major-General Cox. A complete analysis of Esperanto grammar, with helpful lists and examples. ..Cloth	\$2.00
ESPERANTO KEY (English). Esperanto in miniature. .. .10c; 3 for .20c; 10 for .50c	
EDINBURGH DICTIONARY, Eng-Esp and Esp-Eng, 288 pp, best concise dict....	\$1.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Carl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. 80 pp. (war-time edition)30c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. 1942 edition. 490 pp. Cloth	\$3.50
ESPERANTISMO, I. Gomes Braga. Miscellaneous articles about Esperanto movement, in easy excellent Esperanto. Recommended for individual, class, or club reading practice. 32 pp.15c, 10 for \$1.00
TIPOJ KAJ ASPEKTOJ DE BRAZILIO, by the Brazilian Institute of Geography and Statistics. One of the most impressive books in Esperanto. 36 full-page illus., 151 pp., 7 x 10½ in., beautifully printed on deluxe paper. Bound in the following covers.....art paper \$2.00; flex. leatherette	\$3.00
10-in-1 DICTIONARY OF BASIC LANGUAGE, French, German, Spanish, Italian, Russian, Chinese, Japanese, Arabic, Portuguese, Esperanto, 10 languages, including Esperanto, in a nutshell, 110 pp. Paper .50c; Cloth	\$1.50
SEP VANGOFRAPOJ, Karlo Aszlanyi. Most recent novel of the "Epoko Series". Translated from the Hungarian. 145 pp.75c
"LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.25. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto)	\$1.25
LA FINO, by Count Bernadotte, world best-seller, popular edition, paper	\$1.00
LINGVAJ RESPONDOJ, Zamenhof. A standard commentary, deluxe paper....	.75c
JOHANO KAJ SILVIO, Betts. A first reading book in Esperanto.....	.30c
THE LANGUAGE PROBLEM, Its History and Solution, E. D. Durrant. Highly recommended, complete treatise, with index. 168 pp. Cloth	\$1.50
"LA ESPERO" & "LA VOJO." Two separate Esperanto songs, with words and music for piano	Both for .25c
INDIAN BEAD STARS. White background with green star in center.....	.75c
GREEN STAR. Metal, white edge, gold rim, fairly large, brooch or button....	.65c
ESPERANTO AT A GLANCE. Leaflets.....12 for .10c; 100 for .60c; 200 for	\$1.00

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership with "American Esperantist," \$3.00 per year. Sustaining Member, annually, \$5.00. Patron Member, annually, \$10.00. Life Member, one payment, \$100.00. All memberships include "American Esperantist." Your membership in one of the higher brackets will greatly aid in the promotion of Esperanto in North America. Send your membership dues to:

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

ORDER YOUR LINGUAPHONE FROM A.E.

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through *American Esperantist*, for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select from:

Esperanto •	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	•Latin	German	Afrikaans
Malay	•French	Czech	Hindustani
English	•Portuguese	Norwegian	Effik

The regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$50. Most other languages are priced the same. A few are higher, a few lower—dependent upon number of records and other factors. Write to *American Esperantist* about any language in which you are interested. Special arrangements for members of E.A.N.A. Teachers and Club-leaders will receive extra consideration when ordering through *A.E.*

SUPER-QUALITY ESPERANTO CHRISTMAS CARDS

All-Esperanto design, wording and color—printed in Emerald Green and Bronze Blue, on 80 lb. "Fiesta" White Wove, Antique Finish Paper, with beautiful, wide, green deckle edges on both folder and envelope. The outside cover design consists of a large Esperanto Green Star, cleverly made up as Santa Claus. From Santa's right arm (one point of the star), a graceful ribbon floats down to spell out greetings in Esperanto (*SALUTON*). The wording inside, dignified and appropriate, is surmounted by a small green star, ending with the familiar greetings *Merry Christmas—Happy New Year* (all in Esperanto, of course)!

You will want to send your friends—here, there and everywhere—great quantities of these superb representatives of living Esperanto. The folders are double-folded, with envelopes to match, size $4\frac{3}{4}$ x $6\frac{3}{8}$ inches. *Prices:* (folders with envelopes, in complete sets) one for 25c; twenty-five for \$5.00; fifty for \$7.75; one hundred for only \$13—all postpaid. *Send 25c immediately for a sample set*, and we will add an extra set to your quantity order when you are convinced from the sample of their excellence, value and beauty.